WIKIPEDIA

Kroata lingvo

La **kroata lingvo** apartenas al la sudslava lingvaro, subgrupo de la slava lingvaro de la hindeŭropa lingvaro.

La kroata lingvo baze tre similas al la serba lingvo kaj bosna lingvo, ĉar ĉiuj tri evoluis el la novŝtokava. Pli frue oni menciis ilin sub la nocio "serbokroata". Post disfalo de Jugoslavio en la diversajn naciajn ŝtatojn la diversaj variantoj iĝis rekonataj kiel apartaj lingvoj.

Kroata	
Hrvatski	
Parolata en	Kroatio kaj parto de Bosnio kaj Hercegovino, Okcidenta Eŭropo
Parolantoj	6 2 milionoj (1 995)
Skribo	serbkroata latina alfabeto
Lingvistika klasifiko	
▪ Hindeŭropa lingvaro	
Slava lingvaro	
Sudslava lingvaro	
Oficiala statuso	
Oficiala lingvo en	Kroatio, Bosnio kaj Hercegovino
Reguligita de	Institute of Croatian Language and Linguistics
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-1	hr
ISO 639-2	
Bibliografia	scr, hr
Terminologia	hrv
ISO 639-3	hrv
SIL	HRV
Glottolog	croa1245
Angla nomo	Croatian
Franca nomo	croate
Vikipedio	

Enhavo

Aboco kaj elparolo

Disvastiĝo kaj dialektoj

Gramatiko

Diferencoj al serba kaj bosna

Fonetika diferenco

Gramatiko

Vortostoko

Patro nia/Oče naš

Eksteraj ligiloj

Aboco kaj elparolo

La lingvo skribatas per la latina alfabeto kun kelkaj kromsignoj.

La kroata aboco havas 30 literojn + 2 (i+e=ije,r+r=ŕ):

a, b, c, č, ć, d, dž, đ, e, f, g, h, i, j, k, l, lj, m, n, nj, o, p, r, s, š, t, u, v, z, ž.

La literoj q, w, x, y aperas nur en fremdlingvaj nomoj. La digramoj dž, lj kaj nj aperas kiel unuopaj literoj en la aboco (nur ĉe kelkaj vortoj oni devas ilin trakti du literoj). La kromsignoj estas alĝustigeblaj tiel (atenton, la Đ ne intermikseblas kun la islanda Đ):

Č: Č č: č
Ć: Ć ć: ć
Đ: Đ đ: đ
Š: Š š: š
Ž: Ž ž: ž

La plimulto de la literoj estas elparolataj kiel en la Esperanto. Esceptoj:

- č = ĉ
- ć = ĉ aŭ tj.
- dž = ĝ
- đ = mola dj; simila al hungara gy
- h = malantaŭa "aĥ"-Ĥ,
- lj, nj = molaj konsonantoj.
- š = ŝ
- ž = ĵ

d, b, kaj g estas ĉiam voĉaj, t, p kaj k malpli aspiraciaj ol ĉe la germana. La sonantoj e kaj o estas (kompare al la germana) ĉiam malfermaj.



Istarski razvod (istria topografio), manuskripto de 1275

Disvastiĝo kaj dialektoj

La kroatan lingvon parolas ĉirkaŭ 4,8 milionoj da homoj en Kroatio kaj en partoj de Bosnio kaj Hercegovino, precipe en Hercegovino, centra Bosnio kaj bosna Posavina, kiel gepatran lingvon. Ĝi estas oficiala lingvo en Kroatio kaj (kun la bosna kaj la serba lingvo) en Bosnio kaj Hercegovino.

Krom tio ĝi estas minoritata lingvo en Hungario kaj en aŭstra Burgenlando. La burgenlandkroata lingvo havas propran skriban normon, kiu baziĝas sur la ĉakava dialekto.

La dialektoj de la kroata lingvo dividiĝas je tri grandaj grupoj, kiuj estas nomitaj laŭ la demanda vorteto *kio* (ča, kaj, što): ĉakava dialketo (ĉe marbordo, Istrio, Dalmatio, plimulto de la insuloj, Burgenlando), kajkava dialekto (norde de Kupa kaj supra fluo de Save) kaj ŝtokava dialekto (suda Dalmatio, Bosnio kaj Hercegovino kaj Slavonio).

La lingva kodo estas `hr` (laŭ ISO 639)

La kodekso de Vinodol (hr:Vinodolski zakon de hr:Vinodol), 1288

Gramatiko

La kroata havas 7 kazojn: nominativo, genitivo, dativo, akuzativo, vokativo, instrumentalo kaj lokativo.

Diferencoj al serba kaj bosna

Fonetika diferenco

Ĉiu tri lingvoj uzas la samajn fonemojn. Kelkaj vortoj diferencas fakte en la fonetika formo. La ortografio sekvas la fonologajn bazvortojn, la diferenco reaperas en la skriba formo. La plej okulfrapa diferenco estas la *ijekaviŝ* kaj *ekaviŝ* (la diversaj redonoj de la praslava vokalo jato):

ijekaviŝ (kroata, bosna kaj parte serba) vs. *ekaviŝ* (serba en Serbio):

	ijekaviŝ (i-iga formo)	**ekaviŝ (e-iga formo)**	
jato en longaj silaboj	r**ije**ka	r**e**ka	(rivero)
jato en mallongaj silaboj	m**je**sto	m**e**sto	(loko)
jato antaŭ *o*	ht**i**o	ht**e**o	([li volis])

aliaj diferencoj:

	Kroata	**Serba**	
h post *u*	su**h**	su**v**	(seka)
Vortoj kun deveno *opć-*	op**ć**ina	op**št**ina	(komunumo)

Gramatiko

En la kroata oni uzas pli ofte post helpverboj infinitivon, dum ke la serba kaj bosna uzas *da* (ke). Sed ambaŭ variantoj estas permesitaj. Ekzemple:

- Kroata: *Moram raditi* (Mi devas labori)
- Serba: *Moram da radim* ("Mi devas, ke mi laboru")

...

Vortostoko

Diferencoj en la bazvortoj al la serba:

- Kroata: *tjedan*, serba: *nedjelja/sedmica* (semajno)
- Kroata: *tisuća*, serba: *hiljada* [el la greka] (mil)
- Kroata: *zrak*, serba: *vazduh* (aero),...

Kelkaj nocioj diferencas ĉe genro:

- Kroata: *pojava (f)*, serba: *pojav (m)* (apero)
- Kroata: *minuta (f)*, serba: *minut (m)* (minuto)
- Kroata: *osnova (f)*, serba: *osnov (m)* (bazo)
- Kroata: *porez (m)*, serba: *poreza (f)* (imposto)

Krom la malmulta diferenco en la bazvortoj ekzistas pli granda diferenco kompreneble ĉe adaptigo de la fremdaj vortoj:

1. En la kroata lingvo ekzistas relative malmultaj fremdvortoj, anstataŭ tio oni preferis novkreon de vortoj. Tio estis en la 1990-aj jaroj politike apogita: *zrakoplov – avion* (flugmaŝino), *odrezak – šnicla* (tranĉo),... En la ĉiutaga lingvo ekzistas pli da fremdvortoj ol en la skribita lingvo (germanismoj norde, itala influo ĉeborde)

2. La grekdevenaj vortoj estis transprenitaj ĉe la kroata el la mezepoka latina lingvo, la serba transprenis tiujn direkte el la (bizanca) greka: *ocean – okean*, *barbar – varvar*, *kemija – hemija*, *Betlehem – Vitlejem*...
3. En la hodiaŭa kroata la fremdvortoj kun latina radiko ĉiam ricevas la sufikson *-irati*, en la serba *-ovati* kaj *-isati*: *identificirati – identifikovati*, *informirati – informisati*...

Patro nia/Oče naš

Patro nia, kiu estas en la ĉielo, sankta estu Via nomo, venu reĝeco Via, estu volo Via, kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero. Panon nian ĉiutagan donu al ni hodiaŭ kaj pardonu al ni ŝuldojn niajn kiel ni ankaŭ pardonas al niaj ŝuldantoj; ne konduku nin en tenton, sed liberigu nin de la malbono, ĉar Via estas la regado, la forto kaj la gloro eterne.

- Kroata lingvo:

Oče naš koji jesi na nebesima, sveti se ime tvoje Dođi kraljevstvo tvoje, Budi volja tvoja kako na nebu tako i na zemlji. Kruh naš svagdanji daj nam danas i otpusti nam duge naše kako i mi otpuštamo dužnicima našim, ne uvedi nas u napast, nego izbavi nas od zla.

Kroataj dialektoj

Areoj de kroataj lingvoj en la diasistema (en 2006)

Eksteraj ligiloj

- La estiĝo de la kroata literatura lingvo (http://www.ids-mannheim.de/prag/sprachvariation/fgvaria/magisterarbeit_grcevic.pdf)
- Institut Kroata lingvo (http://www.ihjj.hr/index.aspx)
- Akademia Kroata lingvo (http://www.cla-croatian.com/?gclid=CNvpsNiSoqMCFQI03wod4T_i5A)
- Kroata lingvo tehnologia (http://www.hnk.ffzg.hr/jthj/)
- Kroata lingvo korpus (http://www.hnk.ffzg.hr/)

Slava lingvaro

Okcidentslavaj	ĉeĥo-slovakaj (ĉeĥa lingvo • slovaka lingvo • knaana lingvo) • soraba lingvo (suprasoraba lingvo • malsuprasoraba lingvo) • leĥaj lingvoj (pola lingvo • pomoria lingvo (kaŝuba lingvo • slovinca lingvo) • polaba lingvo)
Sudslavaj	okcidentaj sudslavaj lingvoj (kroata lingvo • bosna lingvo • montenegra lingvo • slovena lingvo • serba lingvo •

Orientslavaj	serbokroata lingvo) • orientaj sudslavaj lingvoj (makedona lingvo • bulgara lingvo • malnovslava lingvo) ... belorusa lingvo • ukraina lingvo • rutena lingvo† • rusina lingvo • rusa lingvo • Malnova Novgoroda dialekto†

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Kroata_lingvo&oldid=6773108"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 13:17, 30 okt. 2019.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.